biasanya berwarna merah dan dihiasi dengan manik-manik dalam berbagai warna, sehingga terlihat cantik. Dalam tradisi orang Timor, *Oko mama* adalah hal pertama yang disuguhkan oleh para ibu orang Timor, yang artinya bahwa mereka menghargai tamu yang mengunjungi mereka, sebagai bahasa sapaan, sebagai media komunikasi sebelum mereka berbicara pembicaraan penting. Secara tradisi bahwa *Oko Mama* adalah sarana untuk menyelesaikan masalah-masalah, memepererat tali kekeluargaan, sebagai sarana untuk acara-acara pertunangan, dan sebagai rasa penghargaan kepada para pelayat yang memberikan dukungan, semangat, doa kepada keluarga yang dalam keadaan kedukaan yang mendalam. Banyak orang belum mengetahui bahwa dengan mengkonsumsi *Sirih Pinang* mampu menghilangkan bau napas yang tidak sedap, rasa ngantuk, mencegah gigi berlubang dan fungsi yang lain mampu memperkuat gigi dan sebagai bahan alami pijat tradisional. Untuk orang Timor, tidak makan nasi, itu bukan masalah besar dan yang paling penting buat mereka makan *sirih pinang* karena bisa membangkitkan semangat dalam bekerja. Singkatnya bahwa *Oko Mama* mengandung arti sebagai sarana dalam situasi apa pun; oleh karena itu, *Oko Mama* selalu hadir dalam setiap peristiwa.



Tais dan *Mau* adalah pakaian adat dari masyarakat Timor. *Tais* berarti sarung untuk kaum wanita dan *Mau* berarti selimut untuk kamu pria. *Tais* dan *Mau* dibuat oleh para wanita Timor selama 1 (satu) minggu, 3 (tiga) bulan sampai 6 (enam) bulan lamanya. Seperti *Oko Mama*, apabila wanita Timor mampu mengerjakan *Tais* dan *Mau*, artinya bahwa wanita tersebut siap untuk menikah dan siap sebagai seorang ibu. Jenis motif yang dibuat adalah *Futus*, *Lotis* dan *Buna*. Khusus untuk *Bunahanĝa* dikenakan oleh para *Usif* (Raja), *Kato* (Ratu), *Feot Nai* (Anak Perempuan Raja dan Ratu) dan *Meo* (Para Bangsawan). Kita pun jangan lupa bahwa *Tais* dan *Mau* juga tersedia dalam banyak warna karena setiap warna mempunyai sarat makna dan filosofi pada setiap *Tais* dan *Mau*. Dari *Tais* dan *Mau*, kita bisa belajar tentang kehidupan dan nilai-nilai kehidupan.



Penjelasan singkat diatas tentang Lopo kaj Ume Kbbubu, *Oko Mama* kaj *Tais* dan *Mau*, semoga bisa memberikan gambaran singkat kepada kalian semua yang ingin mengunjungi Pulau Timor dan juga terkenal sebagai bumi Cendana. Tiga hal tersebut adalah warisan tak ternilai yang sudah dipertahankan sejak zaman nenek moyang orang Timor dan hasil dari budaya dan peradaban tersebut bisa dilihat hingga saat ini.

★ Nova Sperto kun Esperanto: Televid-intervjuo

✉ ilia.dewi@gmail.com

Ilia Sumilfia Dewi @ Bekasi

Iu tagmeze mi subite ricevis mesaĝon de malnova amikino kiu diris ke alia amikino kontaktos min pri intervjuo ĉe televidstacio. Ŝi ne multe informis sed kelkaj horoj poste la alia amikino sendis pli da detaloj. Ŝia nomo estas Lea kaj laboras ĉe loka televidstacio de MNC TV. Ŝi okupiĝas pri novaĵoj en Angla lingvo kaj interesiĝas prezenti programon rilate al nova lingvo. Tiel ŝi memoris min ĉar iam ni interparolis pri Esperanto. En tiu programo, ŝi ŝatus intervui min pri la lingvo kaj la movado sed la intervjuo oni fariĝos Angle. Mi poste diris al ŝi ke fakte mi ne parolas bone la Anglan eĉ ĝi estas mia laborlingvo. Tamen Lea konvinkis min ke la respondojn mi povas diri simple kaj ne plu timas pri la gramatikaj eraroj.

Kiel preparado de intervjuo mi legis libreton de "Discover Esperanto-A Fascinating Language". Ĝi enhavas sufiĉe kompletan informon pri Esperanto kiu estas leginda de ne-esperantistoj. Ankaŭ mi iom praktikis paroli malantaŭ la spegulo por forigi la maltrankviliĝon. Dum 2 tagoj mi pasigis la tempon por legi kaj praktiki. Mi tamen devas konfesi ke mi nervoziĝas ĉar intervjuita per Angla ĉe televido estas mia unua sperto.

Tiu matene, Lunde je la 20an de Junio, Mi vekiĝis tiom frue ĉar tiam estis la intervjuita tago. Mi devas alveni antaŭ la 7a horo matene ĉe tiu televidstacio. Tial mi devas foriri de mia hejmo je la 5.30 atm per trajno. Survoje mi daŭre provis trankviligi min kaj pozitive esperis ke la intervjuo fariĝos bone.

Bonŝancon! ke mia vojaĝo bone iris kaj mi alvenis ĝustatempe. Mi facile trovis la konstruaĵon de televidstacio ĉar ĝi lokas en la ĉefa strato kaj proksime de trajnstacidomo. Post kelkaj minutoj de atendado, mi finfine renkontis Lea-n. Ŝi afable bonvenigis kaj tuj invitis min por eniri al la laborĉambro kie mi



vidas multajn oficistojn. Lea prezentis min al la direktoro de programo kiu ekkomencis demandi iom pri Esperanto kaj kiel mi interesiĝas lerni ĝin. Kiam la tempo proksimiĝis al la intervjuo, Lea prezentis min al la ĵurnalistino kiu intervjuos min kaj ŝi gvidis eniri al la studion. Tie du laborantoj jam atendis por prepari min rilate la teknikaĵo.

Je la 8.30 atm, la ĵurnalistino malfermigis la programon aktuale kaj gvidis la intervjuon. Ŝi klare demandis kaj instigis min por multe informi pri Esperanto kaj tiam mi ne plu nervoziĝis.

Respondante al la demandojn, mi rimarkis ke foje mi eraris gramatike. Sed la ĵurnalistino trankviligis min kaj atente aŭskultis mian diraĵon. Pro tio mi ne konsideris ke la intervjuo jam pasis 45 minutojn kaj antaŭ la fino, mi parolis Esperante por montri la prononcadon. Mi ege ĝojis tiam ke la intervjuo jam fariĝis sufiĉe bone eĉ nur mallonge.

★ Ĝakarta E-Klubo Havas Novan Estraron

✉ rizkimaulana9696@gmail.com

Rizky Maulana @ Depok

Post kvin jaroj la Ĝakarta Esperanto-Klubo, Esperiga Suno jam fondiĝas kaj estis gvidita de du prezidantoj. Ĉijare finfine la klubo havas novan vizaĝon por organizi la agadojn. Dum la 5a renkontiĝo de klubo kiu okazis je la 5a de Junio 2016, antaŭprezidanto de Esperiga Suno, **Eko Nur Syah Hidayat** oficiale transdonis la rolon kiel gvidanto al novprezidanto de klubo, **Rizki Maulana**.

La renkontiĝo kiu okazis en Sarinah komenciĝis per la Esperanto-kurso kaj paroliga praktikado pri la Indonezia publikveturilo en estonteco. Post tio, la membroj de klubo festis la ŝanĝon de klubestraro. La antaŭa kasistino de Esperiga Suno, Liola volonte donacis belan kukon por nia festo.

Post la transdono de rolo estis akceptita la nova prezidanto, Rizki donis unuan paroladon kaj prezentis novajn estraranojn

de klubo. Jen la teamo de nova estraro; **Rizki Maulana** kiel **Prezidanto**, **Arya Bhaskara Ferduzi** kiel **Sekretario**, kaj **Sigit Wisnu Santoso** kiel **Kasisto**. Deziante, la novaj estraranoj povus plibonigi la klubon kaj disvastigi la spiriton de Esperanto al pli da Ĝakartaĵoj kaj anoj de ĉirkaŭaj urboj.



Bonvenon al la 8-a Azia Kongreso de Esperanto kaj la 5-a ILEI Seminario en Orienta Azio, Quanzhou, Ĉinio

Kongresa Temo

Esperanto por Azia Kunlaboro en Reta Epoko

Quanzhou situas en Fujian-provinco, suda Ĉinio. Ĝi fieras pri sia agrabla duontropika klimato, kaj alvenante al la urbo vi sentos ekzotikecon ne tipan por ĉina urbo. Ne senkiale, ĉar jen la komenca punkto de la mara itinero de la Silka Vojo. Malfermita kiel havenurbo dum la dinastio Tang (618-907), Quanzhou atingis sian apogeon dum la dinastioj Song (960-907) kaj Yuan (1279-1368). Tiam ĉi tie loĝis eĉ hindoj, araboj kaj persoj. Ĝis nun funkcias moskeoj kaj eblas trovi spurojn de diversaj aliaj religioj. Luj supozas, ke en Quanzhou loĝis Sindbado la Maristo, fama figuro el Mil kaj unu noktoj. Marco Polo notas la ŝajne arablingvan nomon de tiu ĉi urbo "Zayton", kaj ĝin registras ankaŭ la islama vojaĝisto Ibn Battuta.

Pro tia historia fono en Quanzhou ankoraŭ nun regas etoso de interkulturaj aventuroj. Venu do ĉi tien por ĝui tiun etoson, kaj tio helpas vin ricevi inspiron por la perspektivo de Esperanto en Azio! La aventuroj de iamaj ŝipistoj similas al tiuj de nunaj retumantoj, kiuj virtuale navigas, ĉu ne?

Kongresejo

Hotelo Quanzhou Huaqiao

Adreso: 1# Baiyuan-lu, Licheng-qu,
Quanzhou-shi, Fujian-sheng, Ĉinio, CN

Ĉefaj Programeroj

La 3-a, ĵaŭde, Akceptado en la hotelo ĝis 20:00

14:00-17:00 Prelegoj

19:00-21:00 Interkona Vespero

La 4-a, vendrede,

10:00-11:30 Inaŭguro

14:00-17:00 Kunsido pri E-movado en Azio

14:00-17:00 Eduka programero

19:00-21:00 Nacia Vespero

La 5-a, sabate,

09:00-12:00 E-movado kaj eduka programero

14:00-17:00 Promenado en Quanzhou

19:00-21:00 Internacia Vespero

La 6-a, dimanĉe,

09:00-11:30 Vizito al Quanzhou-muzeo

14:30-15:30 Fermo

Paralele okazos ankaŭ la 10-a jarkunveno de IKEF-Ĉinio (komercistoj). Kelktaga postkongresa ekskurso planata.



Kotizo

60 eŭroj por A-landoj, 30 eŭroj por B-landoj/junulo malpli-ol-30jara/kunulo/handikapulo.

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. B: lamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio, Korea Resp.), Ameriko.

100 eŭroj por persono (25 eŭroj/nokto/lito*4 noktoj). 4 tranoktoj kaj matenmanĝoj inkluzivitaj. 1 eŭro → 7.50 RMB.

Rimarkoj

1. La limdato por la pago de la kongresa kotizo kaj hotelmendo estas la 10-a de oktobro 2016;
2. Eblas aliĝi al la kongreso pli poste aŭ eĉ surloke, sed tiakaze vi devas mem zorgi tranoktejon;
3. La pagita aliĝkotizo ne estos redonita eĉ se vi efektive ne ĉeestos la kongreson;
4. Se vi estas handikapulo aŭ havas speciala(j)n kondiĉo(j)n, anoncu tion al LKK;
5. Kongresano mem zorgu pri la akiro de enir-vizo al Ĉinio kaj asekuro por eksterlanda vojaĝo.

Kiel aliĝi kaj kiel mendi?

Aliĝu al la kongreso kaj mendu hotelĉambron prefere sendante retmesaĝon al la Loka Kongresa Komitato aŭ tra ĝia retejo.

LKK Retadreso: aziakongreso@163.com

Retejo: <http://www.esperantoazia.net/>

Poŝta adreso: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Box 825, Beijing, Ĉinio, CN-100037

Telefona: [+86 10 68321808](tel:+861068321808); [+86 10 68995937](tel:+861068995937)

Fakso: [+86 10 68337118](tel:+861068337118)



Reen al Esperanto

Kembali ke Esperanto

✉ sesti.kusmayati@gmail.com

Sesti Kusmayati @ Bandung

Kvar jaroj antaŭe mi kaj miaj amikoj lernis Esperanton ĉe la Muzeo de Azia-Afrika Konferenco. Ni kunvenis semajne dum du horoj, kaj sendepende tradukis la libron Mamutido Miĉjo. Post lerni ok monatojn, finfine ni iris al Hanojo por ĉeesti la 96a Universalan Kongreson en 2012.



Empat tahun lalu saya dan teman-teman belajar Esperanto di Museum Konperensi Asia Afrika. Seminggu sekali selama dua jam, kami berkumpul dan menerjemahkan secara mandiri buku Mamutido Micxjo. Setelah belajar 8 bulan, akhirnya saya dan teman-teman berangkat ke Hanoi untuk mengikuti Universal Kongreso ke 96 Pada tahun 2012.

Di UK, saya bertemu dengan banyak orang dari seluruh dunia. Saya senang mengenal budaya lain melalui penutur asli, bukan hanya dari buku dan tayangan televisi. Suatu hari saya bertemu seorang Cina yang membuka usaha melalui Esperanto. (Saya lupa namanya, maafkan saya!) Saya tanya alasannya berbisnis di komunitas Esperanto. Dia bilang, "penutur Esperanto adalah orang-orang baik. Saya percaya, berbisnis dengan orang baik akan mendatangkan hasil yang baik pula." Saat itu ucapannya terdengar seperti angin lalu.

Sampai sekitar 10 hari sebelum saya pulang, saya kehilangan paspor saya. Saya panik setengah mati, membayangkan keruwetan yang akan saya alami karena tidak semua orang Hanoi bisa berbahasa Inggris. Saya tidak tahu langkah-langkah apa yang harus saya tempuh. Tapi untungnya panitia lokal UK memberi surat keterangan mengikuti UK dan meminta salah satu panitia lokal yang lain untuk mengantar saya mengurus surat kehilangan. Ia mengantar ke kedutaan, ke kantor polisi mengurus surat kehilangan. Untuk mengurus paspor, kami terpaksa tidak mengikuti beberapa kuliah yang menarik. Tapi untungnya, ia mengajak saya ke restoran dan kedai es krim lezat di Hanoi. Singkat cerita, paspor baru saya berhasil diurus, dan saya pun berhasil pulang ke Indonesia tepat waktu.

Ketika kembali ke Indonesia, saya disibukkan dengan pekerjaan dan rutinitas sehari-hari. Saya tidak belajar Esperanto, tidak datang ke klub Esperanto juga tidak berbicara lagi dengan Esperantis lainnya. Saya meninggalkan gerakan itu. Beberapa tahun pun berlalu. Dua bulan sebelum Trilanda Kongreso berlangsung, tiba-tiba ada kerinduan untuk belajar bahasa ini. Saya mengingat semua kebaikan yang saya terima berkat Esperanto. Saya mengingat teman saya, Phuong; guru saya, Tatjana, dan teman-teman Esperantis lainnya. Saya membaca kembali majalah lama, berlatih di Duolingo, dan memutuskan untuk kembali, dan membantu apa yang saya bisa untuk gerakan ini.

En la UK, mi renkontis multajn homojn el la tuta mondo. Mi estis kontenta scii aliajn kulturojn tra denaskuloj, ne nur el libroj kaj televidprogramoj. Unu tago, mi renkontis kun ĉinano kiu malfermis la komercon Esperante. (Mi forgesas lian nomon, pardonu min!) Mi scivolis kial li faris komercon en la komunumo de Esperanto. Li diris, "Esperantistoj estas agrablaj homoj. Mi kredas, fari aferon kun bonuloj alportos bonajn rezultojn." Tiam, liaj vortoj sonis kiel vento.

Ĝis ĉirkaŭ 10 tagoj antaŭ ol mi revenis hejme, mi perdis mian pasporton. Mi panikis kiel infero, imagis la malfacileco mi speratus ĉar ne multaj hanojanoj povas paroli angle. Mi ne scias kion mi devas fari. Sed feliĉe la LKK en la UK donis deklaron post la UK kaj petis alian lokan komitaton por prizorgi la leteron de perdita pasporto. Li pelis min al la ambasadejo, kaj poste ni iris al policejo por fari raporton. Pro tio, ni ne povis partopreni kelkajn interesajn prelegojn. Sed feliĉe li prenis min al restoracio kaj glaciaĵo vendejo en Hanojo. Mallongan rakonton, mi sukcesis akiri novan pasporton, kaj mi eĉ sukcesis reveni al Indonezio ĝustatempe.

Kiam mi revenis al Indonezio, mi estis okupita kun laboro kaj ĉiutaga rutino. Mi ne lernis Esperanton, ne venis plu al la Esperanto klubo, ankaŭ ne parolis plu kun aliaj esperantistoj. Mi forlasis la movadon. Kelkaj jaroj pasis. Sed, du monatoj antaŭ okazis la Trilanda Kongreso, subite mi sopiris lerni tiun lingvon. Mi memoris ĉiujn bonecajn mi ricevis danke al Esperanto. Mi memoras la dirado de la Ĉinano; la boneco de mia amiko, Phuong; Mia instruisto, Tatjana; miaj amikoj kaj ankaŭ aliaj esperantistoj. Mi relegis malnovajn revuojn, praktikis per Duolingo, kaj decidis reiri kaj helpi, kion mi povas por tiu movado.


Ayo selalu kunjungi situs kita untuk mendapat informasi terkini...



<http://www.esperanto.or.id/>

Amu Vian Proksimulon Kiom Vin Mem!

Bob Felby @ Adelajdo



Antaŭ, ni diru, 50 jaroj aŭ eĉ pli, laboris eksterlandano en Anglujo. Li sciis multon pri kokinoj kaj iliaj vivoj kaj tial li laboris en t.n. kokinejo kie oni produktis ovojn! Por produkti ovojn oni vere bezonas kokinojn, ĉu ne? Sed kompreneble tio dependas de la grandeco de la ovoj kiujn oni esperas vendi. Se kokinaj ovoj ne estas sufiĉe grandaj, oni tute ne havu kokinojn. En tiaj kazoj estas multe pli bone investi sian ne sufiĉan monon en strutoj!

Sed tiu juna kaj laborema eksterlandano loĝis tie en komforta dometo. En la teretaĝo estis kuirejo kaj manĝejo, du sidoĉambroj kaj necesejo, sed la necesejo situis iomete ekster la ĉefkonstruaĵo, sed tamen en la teretaĝo. En la supra etaĝo troviĝis du dormoĉambroj. Do, ne malbona loĝejo por juna eksterlandano kun eĉ tre belega edzino, kiu estis denaska anglino. Ili kune havis du etajn filojn. Krom tio la familio konsistis el neniuj hundo, sed du katoj. Unu testudkolora kaj alia nigra. Mi preskaŭ forgesis mencii la plej gravan — kaj ravan— membron de la bona familio, etan blankan raton, kies nomon mi ne plu memoras.

lun belan tagon, eble estis dimanĉo, ĉu vi volas ke tiu estu dimanĉo? Do bone, iun dimanĉan matenon la ĉarma familio sidis en unu el la teretaĝaj sidoĉambroj de la dometo, t.n. mueleja dometo ĉar ĝi ja apartenis al la muelejo situanta tuj apud la dometo.

La du gepatroj sidis ĉe la tablo. Ili manĝis sian matenmanĝaĵon. Ĉe la tablo sidis ankaŭ la du filetoj, sed ili sidis sur specialaj seĝoj konstruitaj por infanoj ĉar la du filetoj ja estis ankoraŭ nur infanoj. Nun, pli ol kvindek jarojn poste, ili sidas, same kiel siaj gepatroj, sur ordinaraĵoj seĝoj ĉe la tablo kaj manĝas sian matenmanĝaĵon.

La du katoj, unu nigra kaj alia testudkolora, sidis manĝante sian matenmanĝaĵon sur la planko. Ilia manĝado estis multe pli rapida ol tiu de la gepatroj, sed eble ĉar la gepatroj manĝis multe pli da matenmanĝaĵo ol la katoj. Do, baldaŭ la katoj estis finintaj sian matenmanĝadon kaj iris kuŝi kaj dormi, ĉar post sia manĝado ili ja estis tre lacaj kaj dormemaj. Tiaj estas katoj, kredu min, mi havis multajn!

Sed la rava rato, la belege blanka beluleto, kuris tien kaj reen sur la tablotuko sur la supro de la manĝotablo. Li, ĉar li ne estis ŝi, kolektis manĝaĵon por si mem. Precipe kiam la familio manĝis biskvitojn la rava rato estis tre okupita kaj feliĉega. Li prenis tutan biskviton per sia malgranda buŝo, fakte buŝeto, kaj saltis de la tablo al sur la breto sur la muro. Meze sur tiu breto staris la eta hejmo de la rava rato. Li havis sian propran

pordeton tra kiu li devis eniri por fine esti hejme. Sed kun la grandega biskvito en la buŝo estis treege malfacilege por la rava rato eniri sian hejmon. La biskvito certe ne permesis al li eniron ĉar ĝi ja estis pli granda ol la enirejo. Do, kion faras saĝa kaj rava rato? Li revenas la tutan longan vojon al la supro de la manĝotablo kaj petas al unu el la gepatroj ĉu tiu bonvolos rompi la biskviton por ke la rava rato povu iri hejmen kaj manĝi ĝin. Tion faris eĉ tre volonte kiu ajn el la du gepatroj, kaj baldaŭ la ravuleto povis sidi en sia privata hejmo ĝuante sian bongustan matenmanĝaĵon.


Sed meze de tiu idilia etoso okazis io kio sendube ridigos vin, mia kara legant(in)o, ĉar vere okazis io tute kaj tre eksterordinara.

El la kuirejo en la sidoĉambron eniris grandega blanka porko. Liaj du okuloj petante rigardis en la okulojn de la du gepatroj. La okuloj estis eĉ tre facile kompreneblaj; ili diris: "Karaj du bonaj homoj, ĉu vi bonvolas helpi min? Miaj mastroj intencas mortbati kaj manĝaĉegi min!"

La du gepatroj rigardis unu la alian. Tiam ili rigardis rekte en la malgrandajn okulojn de la grandega porko. Bonvolu ne forgesi ke porkoj ĉiam parolas per siaj belegaj okuloj. Al tiu ĉarmega vizaĝo de la senhelpa kaj endanĝerigita porko estis kompreneble ne eble rifuzi ion ajn. La porko kompreneble ne sciis ĉu ili helpos ĝin aŭ ne. Ĝi provis kaŝi sin sub la tablo, sed ĝi estis tro grandega por kaŝi sin ie ajn. Tiam la patro diris: "Bonega kaj grandega porko, eĉ porkego. Kiu povus ne ami vin? Vi estas ja belega kaj vi havas bonan koron. Kompreneble ni helpos vin! Ni havas malplenan porkejon en la malantaŭa ĝardeno. Ni disponigos ĝin al vi por la cetera parto de via surtera vivo. Neniu scias ke vi loĝos tie. Dum manĝotempoj vi eniros ĉi tiun sidoĉambron kune kun ni kaj la du filetoj, la du katoj, unu el kiuj estas nigra kaj la alia estas testudkolora. Krom tio vi rajtas amikiĝi ankaŭ kun la ĉarmega, rava rato, kies nomon mi estas forgesinta. Sed vi rajtas nomi lin kion ajn ĉar vi estas ja eĉ tre inteligenta besto kun ĉarmegaj vizago kaj okuloj!"

Kaj la grandega porkego ploregis larmojn de ĝojo kaj feliĉo kaj ĉirkaŭbrakis la du gepatrojn, la du filetojn, la du katojn kaj la etan, ĉarman kaj ravan blankan raton. Nun ankaŭ ĝi estis membro de la feliĉega familio. Ĉar kiel diras la malnova proverbo: "Faru bonon, kaj via familio pligrandiĝos!"

La patro de la familio eliris en la ĝardenon. Li rigardis ĉirkaŭen kaj vidis du virojn, mi certe nepovas nomi ilin sinjoroj. Ili ambaŭ kunportis longajn dikajn bastonojn. Iliaj kruelaj okuloj rigardis ĉiun





direkton, ĉar fakte ili serĉis la forkurintan bonkoran porkon. Ilia intenco estis mortbati ĝin kaj poste manĝegaĉi ĝin.

Sed tio kompreneble ne okazis ĉar ankoraŭ estas justeco en la mondo. Eĉ en tiu ĉi mondo! La grandega porkego ĝisvivis la finon de sia feliĉa vivo parte en sia propra hejmo en la ĝardeno kaj parte kune kun la bonkora familio en la mueleja dometo. Multajn jarojn poste la grandega porkego forlasis sian tiam eluzitan korpon kaj la patro de la bonkora familio plorante enterigis ĝin en la ĝardenon. Neniu sciis ion ajn pri la tuta afero ĉar ordinaraĵoj ankoraŭ ne estas sufiĉe maturaj por kompreni tiajn aferojn!

Jarojn poste la familio, nun sen sia adoptita kaj amata porkofilo, elmigris al tute alia kontinento kie oni certe ne akceptus la patron kiel kokiniston. Li do iĝis ordinara laboristo. Liaj du filoj plenkreskiĝis kaj forlasis lin, lia edzino forpasis, kaj la du katoj kaj la rava blanka rato estis elkarniĝintaj en Anglujo multajn jarojn antaŭe. Nun li estis tute sola escepte de unu malgranda blanka hundo. Kiu povas diveni kiu ĝi estis multajn jarojn antaŭe? Sed iun belan tagon, fakte en la somero, alvenis al la pordo de la ekskokinisto junulo belege vestita, kaj tio

estas io tre eksterordinara en la lando en kiu nun loĝis la iama kokinisto.

La junulo sin prezentis dirante: "Vi verŝajne ne memoras min. Iam, antaŭ multe da jaroj, mi iĝis via filo. Mi estis en Anglujo morte persekutata de du viroj kiuj volis mortbati kaj manĝegaĉi min. Mi venis al via domo kaj petis kompaton, kaj vi kaj via bonkora familio akceptis min kaj zorgis pri mi ĝis la fino de miaj tiamaj tagoj. Mi restas ĉiame dankema al vi ĉiuj! Post la fino de mia surtera vivo, mi eniris en la Spiritan Mondon kie mi ankoraŭ loĝas. Mia gardanta spirito hieraŭ diris al mi ke mi devus iri saluti vin kaj doni al vi ion kio povas plibonigi kaj plifaciligi viajn restantajn jarojn en la Materia Mondo. Bonvolu akcepti ĉi tiun ĉekon de \$500.000 por ke ankaŭ vi povu ĝui feliĉajn ceterajn jarojn de via vivo! Eble vi povas eĉ iri kaj partopreni iun el la bonegaj Universalaj Kongresoj de Esperanto sur la Tero!" La ekskokinisto provis esprimi siajn sincerajn kaj elkorajn dankojn, eĉ dankegojn, sed la belvestita junulo estis jam elfaldinta siajn pure blankajn flugilojn kaj survojis al sia hejmo en la Spiritita Mondo. Kun malsekaj okuloj la ekskokinisto rigardis la puran spiriton ĝis ĝi subite malaperis malantaŭ grandega nuboj.

🇬🇧 Kiamaniere Mi Fariĝis Homo: Mia Revo Estis Scio Kaj Libero



Alma M. Karlin


imiliana Karlin (1889-1950) el Celje/Cilli/Celeo en Slovenio.

La delikata, kuraĝa, inteligenta kaj ankaŭ ambicia fraŭlino Alma M. Karlin devenas el la sudstiria provinconesto de la malnova Danubmonarkio, tamen ŝi iĝis unu el la plej famaj kaj plej admiritaj eŭropaj vojaĝlibraj aŭtoroj de la 1930-a jaroj, precipe pro siaj mondvojaĝoj inter la jaroj 1919-1927 kaj pro la el tio rezultitaj vojaĝspertaj libroj, kiel: *Einsame Weltreise* (Soleca mondvojaĝo), *Im Banne der Südsee* (Subsorĉe de la Suda Maro) kaj *Erlebte Welt* (La travivita mondo)-kiuj laŭvice aperis ĉe la eldonejo Wilhelm Köhler Verlag en Minden en Vestfaliao kaj per 50.000 venditaj ekzempleroj spite la tiaman malbonan ekonomian situacion en Germanio kaj en Aŭstrio estis veraj sukcesegendaĵoj.

Jerneja Jezernik @ Slovenio

Senrigarde, ĉu oni pretas tion agnoski aŭ ne, sed Mezeŭropo ankaŭ niampe pro sia komplika pasinto plenas je prisilentitaj rakontoj. Unu el ili, kiu finfine devas esti nove malkovrita kaj denove rakontita, estas la priviva kaj priverkada rakonto pri la kosmopolito, mondvojaĝinto kaj primondverkinto, fraŭlino Alma Max-

Alma Karlin-la filino de la jam oldiĝintaj gepatroj, de 60-jara aŭstria-hungara majoro kaj de 45-jara instruistino-naskita la 12-an de oktobro 1889, naskiĝis maldekstraflanke facile lamiĝinta kaj laŭ la kuracista prognozo ŝi devus dum sia tuta vivo resti ankaŭ mense hendikapita. Ĉar ŝi "pli kiel animo ol kiel korpo" ŝajnis, ŝi estis nomita Alma, Animeto. Estinte kvar jarojn aĝa, sub la kristnaska arbo troviĝis eta muskoloreta kofro kaj pliaj por oceana navigado nepraj objektoj por ŝin tiamaniere hororigi-ja se al ŝi io estis malpermesita, ŝi minacis al siaj gepatroj ĉiam tute energie: "Mi forvojaĝos al Ameriko!" Cetere, ŝi estis eksterordinare timema, silenta kaj en sin fermita infano. Post la morto de sia patro, kiu kiel la sola plenkreska persono trovis vojon al ŝia animo kaj deziris ĉe si, ke la eta knabino estu korpe fortika kaj anime forta, ŝanĝiĝis tiam ŝia mondo resp. ŝia senpera ĉirkaŭo tre forte. La patrino dediĉis sin, rilate sian edukadon, plu ĉefe al la ekstera plibeligo de sia filino. Tiel Alma devis ofte dum horoj vagadi tra la malhelaj ĉambroj de ilia malnova roma domo-kun fiksitaj okulŝirmiloj kaj orelŝirmiloj dense ĉekape, kun manoj dorse krucumitaj, por ricevi belan rektiĝiran sintenon kaj sub la severa ordono, turni siajn piedojn eksteren. Sed venis ankoraŭ pli malagrablaj tagoj. Dum kelkaj jaroj la adoleskinta fraŭlino estis sendita al certa ortopedia sanatorio en Labako (Ljubljana), la nuna ĉefurbo de Slovenio, kie ŝi suferis korpe pro la ekzercoj en gimnastiko kaj sinetendiĝo, kiel ankaŭ





anime. Vere brave, kun obstina eltenado ŝi sukcesis, estinte 18 jarojn aĝa, fari ekzamenon por esti instruistino de la franca kaj angla lingvoj.

Tiamaniere la unua grava ŝtono por ŝia libero kaj memstareco estis metita. Por fine sin emancipi de sia patrino kaj de la etburĝa medio de Celeo kaj por povi kontraŭstari ĉion kaj ĉiun, ŝi forvojaĝis al Londono. En la metropolo kun sep milionoj da loĝantoj ŝi dumtage laboris en iu tradukaranĝa buroo, kaj en sia eta libertempo ŝi studis lingvojn. En la jaro 1914 ŝi finekzamenis ĉe la Society of Arts en la brita metropolo pri ok lingvoj kun la plej bona sukceso en la itala. Sed nur antaŭ ne-longe estis malkovrite, ke ŝi parolis ankaŭ Esperanton kaj ĝin instruis. Post la nuligita fianĉeco kun iu Ĉino kaj dum la esplorado de la mondmilito ŝi migris en neŭtralan Norvegon kaj poste Svedion. En Skandinavio denove aperis ĉe ŝi interna premo el ŝia infaneco, esprimi siajn spertojn en versa formo kaj siajn travivaĵojn priskribi proze. Tie ŝi ankaŭ faris decidon, fariĝi verkisto kaj mondvojaĝanto. Denove reveninta en sia hejma urbo Celeo ŝi fondis privatan lernejon por fremdaj lingvoj, en kiu ŝi, se nepre, instruis ankaŭ dek horojn potage, por tiel akumuli sian startkapitalon por la planitaj mondvojaĝoj.

La 24-an novembro 1919 la afero iĝis matura. Provizita per la tajpmaŝino Erika, sen ajna subteno fare de subvenciantoj, rekomendaj leteroj, ligoj kaj akompanoj, nur kun fido je propa forto kaj obstino, kiel ankaŭ je propraj kapacitoj, ĉie en la mondo aranĝi por si eblecojn perlabori monon per instruado, verkado kaj tradukado, vojaĝis ŝi perŝipe unue al Sudameriko. Ne per la aventuro, sed per la plano, per vorto kaj skribo labori inter la popoloj por la tutmonda paco kaj samtempe observi la mondon precipe per la okuloj virinaj, ŝi estis allogita en la larĝan mondon, tien ĝis la plej ekzotaj fremdaj landoj. Kiam ŝi post pli ol ok jaroj, fine de decembro 1927 revenis al Celeo, korpe plene elĉerpita pro atakoj de malario, tropikaj malsanoj kaj stomakdoloroj kaj psike plene malfortiĝinta, malantaŭ ŝi estis vojaĝa navigado kaj esplorado ĉirkaŭ la tuta terglobo. Ŝia atlantika vojaĝo en la tria klaso meze inter du ŝipetaĝoj kondukis ŝin de Ĝenovo unue al Sudameriko kaj Mezameriko: ĝis la indiĝenaj virinoj, kiuj per magio kaj magiaj formuloj okupiĝis, kaj ĝis la viraj indiĝenoj, kiuj preparis al ŝi la plej oftajn malfacilaĵojn kaj ŝin malestimis; kvankam iu poeto en Peruo konkeris ŝian koron. En Usono kaj Havajo regis, laŭ la sperto de Alma, unu nura lingvo: "Money, money, money." Poste ŝia vojaĝo kontinuus ĝis Japanio, kie la mondvojaĝanta virino el Celeo povis kompili siajn plej belajn vojaĝmemorojn. Ŝi laboris dum certa tempo en la germana ambasejo en Tokio kaj ŝi havis aliron al multaj tiutempaj japanaj artistoj, kiujn ŝi admiris kaj de kiuj ŝi lernis pentri japanstile. Eĉ ŝi enamiĝis en japanan pentriston, sinjoron I., kies "Domon de la Homoj" respektive la domon de ilegale liberigitaj gejoj ŝi poste en Taivano rapidege forlasis. Sekvis Ĉinio, Koreio, Aŭstralio kaj Novzelando kiel la plej interesaj vojaĝceloj de ŝi. En la Suda maro Alma dum du jaroj sin ekspoziciis al ekstremaj kondiĉoj kaj

entuziasme studis diversajn sorĉadojn super amo kaj morto, la superstiĉojn pri diversaj diaĵoj kaj ankaŭ la kuriozajn kutimojn de la indiĝenoj sur la sennombraj sudmaraj insuloj, kion ŝi poste ankaŭ en siaj libroj "Mystik der Südsee" (La mistiko de la Suda maro) elĉerpe priskribis. Antaŭ la reveno hejmen ŝi akompanite de forta penado kaj sub la ekstrema sinofero frekventis ankoraŭ Indonezion, Novgvineon, Javaon, Malajision, Hindion kaj Pakistanon. "Ok jaroj da eterne interŝanĝantaj mirakloj, impresoj, landoj, popoloj, spertoj, sinoferoj; ok jaroj da malfacilaj luktoj, sed ankaŭ da plej profundaj travivaĵoj faris min tio, kio mi nun estas. Se la kolerao de tropikoj min ŝanĝis kaj la arde varmegaj tropikoj min ardigis, tamen la mistiko de multaj rasoj ĉion ĉi vualis per kvazaŭ arĝenta vaporo, kio tuŝis mian koron. Malantaŭ la amara troviĝas la bela; malantaŭ la humiliĝoj kaj suferoj troviĝas la grandeco kaj la profundeco, kaj tiu nekutima miksaĵo de bono kaj malbono likviĝas en lagon de memoroj, el kiu mi ĉerpas miajn verkojn. Mi ĉiukaze vidas la mondon per aliaj okuloj ol la plimulto da homoj, tamen mi min konsolas per la penso, ke probable tie troviĝas mia unuela valoro kiel verkisto, ĉar mi ĉi tie registras signalojn el diversaj vizaĝanguloj, kiuj por la aliaj restas nevideblaj."

Dum sia mondvojaĝo ŝi sukcesis konekti ligan kun la germanaj, aŭstria, kiel ankaŭ kun la japanaj, ĉinaj kaj aŭstraliaj gazetoj kaj revuoj, kiuj publikigis ŝiajn vojaĝskizojn kaj aliajn kontribuojn. En la jaro 1921 aperis ankaŭ ŝia unua romano "Mein kleiner Chinese" (Mia eta Ĉino). Tuj post ŝia reveno hejmen en Celeo fine de Decembro 1927 ŝi prilaboris siajn vojaĝtravivaĵojn por proponi ilin sur la germanlingva merkato. Ŝia vojaĝtrilogio "Einsame Weltreise" (La soleca mondvojaĝo), "Im Banne der Südsee" (Sub la sorĉo de la Suda maro) kaj "Erlebte Welt" (La travivita mondo) en Germanio kaj Aŭstrio fariĝis financa kaj publiksimpatia sukceso. Ŝi same estis invitita al multaj prelegoj kaj radiodissendoj en tuta Eŭropo. La fraŭlino Alma M. Karlin fascinis siajn legantojn kaj aŭskultantojn per sia preciza kaj akraspirita talento de observo, per kiu ŝi vidis ĉion kaj volis ĉion esplori kaj kompreni. Ŝi (sub)konscie ĉie en la mondo kunprenis Eŭropon kiel mezurunuon kun si, tamen ŝi vidis kaj raportis multe pli detale kaj nuancriche ol ŝiaj viraj vojaĝkolegoj el Eŭropo tion faris. "Kio estas la aventura vivo de grandskalaj viroj kontraŭ la virina vivo kiel tiu ĉi," skribis la germana revuo "Monatshefte" en Berlino kaj per tio diris, kion ankaŭ multaj legantoj sentis: la fortan admiron super tiu ĉi virino. "La plej aventura vojaĝlibro de nia tempo. [...] Alma M. Karlin malkovris neniun novan landon, sed la aventuroj de la ĉiutaga vivo, kiujn ŝi renkontis dum sia mondvojaĝo, estas pli streĉaj kaj stimulaj ol la raportoj de kelkaj esplorvojaĝoj" estis skribite en la raportoj de "Deutsche Kolonialgesellschaft" (Germana kolonia societo). "La vojaĝoj de niaj grandaj esploristoj estas, kompare kun tio, kion Alma M. Karlin travivis, komfortaj promenoj", raportis "Das Echo" el Berlino. Paralele kun la vojaĝlibroj viciĝis en la sekvaj jaroj ankaŭ romanoj kun eksota kaj teozofia fono,



Internaciaj E-aranĝoj en Azio

Komence	Fine	Agendo	Urbo	Lando
11-Jun-2016	12-Jun-2016	65-a Kantoo-Esperanto-Kongreso	Tokio	Japanio
18-Jun-2016	19-Jun-2016	64-a Kansaja Esperanto-Kongreso	Osako	Japanio
17-Sep-2016	19-Sep-2016	Aŭtunaj tagoj de Esperanto-Domo de Jacugatake	Jamanaŝi	Japanio
1-Okt-2016	3-Okt-2016	48-a Korea Kongreso de Esperanto	Seulo	Koreio
8-Okt-2016	10-Okt-2016	La 103a Japana Esperanto-Kongreso	Ŝiga	Japanio
3-Nov-2016	6-Nov-2016	8-a Azia Esperanto-Kongreso	Quangzhou	Ĉinio
5-Nov-2016	6-Nov-2016	17a Ĉuugoku/Ŝikoku-Esperanto-Kongreso	Ehime	Japanio
26-Nov-2016	27-Nov-2016	Namkang-a Esperanto-Lernejo	Chongdo	Koreio
30-Dec-2016	2-Jan-2017	Transjara Kurskunveno de Esperanto	Kameoka	Japanio



← Kiamaniere Mi Fariĝis...

rakontoj kaj eseoj, sed ĉiuj kun malpli da sukceso. Post la II-a mondmilito subite ekregis ĉirkaŭ ŝi silento. Al la germanlingva aŭtoro-la germana lingvo kiel la lingvo de la okupanto ankoraŭ longtempe post la II-a mondmilito en Jugos-lavio malrespektita-la nova jugoslavia aŭtoritato pro malfido ne disponigis pasporton kaj tiel ŝi en eksterlando ne povis akiri vendomerkaton por siaj jam verkitaĵoj. Kaj tio spite la fakton, ke ŝi partoprenis la partizanan batalon kaj ke ŝi estis

enprizonita en la nazia karcero en Celeo kaj ke ŝi publike akuzis la reĝimon de Hitler. Alma M. Karlin mortis en la jaro 1950 en amara povreco kaj kiel artisto plene forgesita en eta kabano en la holmo Pečovnik apud Celeo.

“Mi verkos dum helaj kaj malhelaj tagoj, ĝis la Eternulo forprenos la plumon el mia mano. Por verki ni verkistoj tamen estis naskitaj, kaj ni devas tiom longe lukti kaj tramalsatiĝi, ĝis ni klare pruvis, ke nia arto estas la plej alta afero de niaj koroj”, skribis la esperantisto kaj la granda mondvojaĝanto el Celeo Alma M. Karlin.

Postskribo

ESPERANTO EN INDONEZIO estas neregula bulteno por la indoneziaj esperantistoj kaj iliaj amikoj. Ĝin redaktas teamo de volontuloj kaj ĝi aperas danke al la kontribuoj de indoneziaj kaj alilandaj kunlaborantoj kaj al la donacemo de malavaraĵoj subtenantoj. Nek la redaktantoj nek la kunlaborantoj ricevas ajnan rekompencan pro sia laboro. Al ĝi povas kontribui kiu ajn, se la kontribuado konformas kun la celoj de la bulteno.

Por havi kiel eble plej kvalitan bultenon kaj por faciligi la laboron de la redaktantoj, ni petas niajn kunlaborantojn atente legi la sekvajn sugestojn/petojn kaj sekvi ilin.


- Akcepteblas tekstoj nur en Esperanto kaj la Indonezia lingvo;
- Prefere verku nelongajn tekstojn en unu el la lingvoj menciitaj ĉi-supre kaj aldonu al ĝi resumon, maksimume centvortan, en la alia lingvo;
- Antaŭ ol sendi la tekstojn, nepre kontroligu ilin pere de aliaj (pli spertaj) kolegoj. Tio povas okazi kadre de Esperanta kunveno aŭ leciono, aŭ rete. La tekstoj estu kiel

Tulisan Penutup

ESPERANTO EN INDONEZIO adalah buletin bebas untuk esperantis Indonesia dan kawan-kawan. Adalah para relawan yang mengerjakannya, buletin ini dapat terbit berkat kontributor dalam dan luar negeri serta para donatur yang dermawan. Tim redaksi mau pun kontributor tidak menerima kompensasi apapun atas kerja mereka. Siapa pun dapat berkontribusi, asalkan selaras dengan tujuan buletin ini.

Agar buletin dapat dibuat dengan kualitas terbaik serta memudahkan pekerjaan redaktur, mohon para kontributor membaca saran/petunjuk dengan teliti dan mematuinya.

- Redaksi menerima tulisan berbahasa Esperanto dan Indonesia;
- Ada baiknya menulis tulisan singkat dalam salah satu bahasa yang disebutkan di atas, dan berikan ringkasan (maksimum 100 kata) dalam bahasa satunya lagi;
- Sebelum mengirim tulisan, sebaiknya periksa tulisan bersama orang yang lebih berpengalaman. Lakukanlah di pertemuan





eble plej seneraraj kaj en bona stilo;

- Bonvolu sendi la tekstojn en redakteblaj formatoj. Ne sendu .PDF-dokumentojn!
- Sendu ankaŭ altkvalitajn bildojn, kaj nepre ne en la teksta dokumento. La bildoj devas veni kun jenaj informoj por ĉiu: klarigo de la bildo (titolo) kaj fotinto. Se vi ne estas la fotinto, ne sendu foton sen la skriba permeso de ĝia aŭtoro. Atentu: ne sendu tro da bildoj en unu mesaĝo iuj povus malaperi survoje;
- Bonvolu sendi la kontribuojn kiel eble plej frue. Ne atendu ĝis la lasta momento;
- Estu preta reagi rapide al la petoj de la redaktoroj kaj respektu la limdatojn;
- Ĉiujn materialojn oni sendu al la jena retadreso: iea@esperanto.or.id.

Se vi bezonas pliajn informojn aŭ klarigojn, bonvolu kontakti nin per la ĉi-supra retadreso.

La limdato por kontribuoj al la 11a eldono estas la 20a de Oktobro 2016. Dankon.


Esperanto atau secara online. Hindari kesalahan tulisan dan buatlah dalam gaya yang baik;


- Mohon kirimkan tulisan dalam format yang dapat disunting. Jangan kirimkan tulisan dalam format .PDF!
- Kirimkan juga gambar berkualitas tinggi, yang terpisah dari dokumen teks. Sertakan penjelasan gambar dan pembuat foto. Jika Anda bukan pembuat foto, jangan kirimkan foto tanpa izin tertulis dari pemiliknya. Perhatian: jangan mengirim banyak gambar dalam sekali pengiriman. Foto bisa saja hilang saat pengiriman;
- Silakan kirim kontribusi Anda sesegera mungkin. Jangan menunggu hingga tenggat waktu;
- Bersiaplah untuk bereaksi dengan cepat merespon permintaan redaksi dan mematuhi batas waktu;
- Kirimkan seluruh materi ke alamat berikut: iea@esperanto.or.id.

Jika Anda memerlukan lebih banyak informasi dan penjelasan, silakan hubungi kami melalui alamat e-mail di atas.

Batas akhir penyerahan naskah untuk edisi 11 adalah 20 Oktober 2016. Terima kasih.

Esperanto en Indonezio

 Duonjara oficiala bulteno de la Indonezia Esperanto-Asocio (IEA). Naskiĝis en 2013. Sendita al IEA membroj senpage.

 *Buletin per semester resmi dari Asosiasi Esperanto Indonesia (AEI). Terbit semenjak tahun 2013. Didistribusikan kepada anggota AEI secara cuma-cuma.*



Ĉefa Redaktoro

Penyunting Utama

Arman Yusuf

Plenuma Redaktoro

Penyunting Pelaksana

Ilia Sumilfia Dewi

Provleganto

Penyunting Bahasa

Piet Buijnsters
(Nederlando)

Alamat Redaksi

Redaktoro-Adreso

Wisma Sarinah Lt. 1 (Gripwell)

Jl. Majapahit No. 8

Jakarta 10160 Indonesia

✉ iea@esperanto.or.id

☎ [+628-111-77-33-87](tel:+628-111-77-33-87)

